BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

CGC Nº
00406 504/1000-06

# Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL
Sede: Edifício Jockey Clube, sala 103
Setor Comercial Sul

PRESIDÊNCIA
Rua Galeão Carvalhal, 31 – AP. 73
Telefone 4-8033
11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA
Caixa Postal 07 – 1182
Telefone 226-1298
70.000 – Brasília (DF)

**JULHO/AGOSTO DE 1980 ÓRGÃO OFICIAL DO BKE BOLETIM Nº 56**

**Redação: MARIA ALMADA**



*Samideano Humphrey Tonkin transdonas la postenon al nova prezidanto de UEA – S-ro Grégoire Maertens.*

## 65-A U. KONGRESO DE ESPERANTO

Okazis en Stockholmo, Svedujo, de la 2-a ĝis la naúa de aúgusto la ĉijara U.K., kiun partoprenis ĉirkau 1.800 personoj.

La temo de la evento estis **Diskriminacio**, kiu estis pridiskutida detale per diversaj grupoj, sen ia ajn solvo.

La plej grava kaj interesa parto de la programo estis la elekto de nova direktoraro kaj de prezidanto de UEA por la sekvanta periodo.

La nova prezidanto estas s-ro Grégoire Maertens, el Belgio. Li estas ekonomiisto kaj jam de kelkaj jaroj prizorgas la financan parton de UEA kun granda sukceso. Li mem diris al ni, ke kiam li transprenis la librotenadon kaj taskon por zorgi pri la monrimedo, en la kaso estis 9.000 guldenoj kaj dum lia agado la monsumo atingis 40.000 guldenojn. Sekve UEA estas nun sufiĉe forta por plenumi siajn planojn, disvastigi Esperanton en diversaj mondpartoj, kie ĝi ne estas konata kaj prizorgi la propagandon en landoj, kie la internacia lingvo jam estas konata. UEA dum la lastaj ses jaroj rimarkeble plifortiĝis.

La Kunlaborantoj de S-ro Maertens estas Renato Corsetti, Ursula Grattapaglia, Eliza Kehlet, Baldur Ragnarsson, Flora Szabo Felsö, Humphrey Tonkin kaj Pedro Todorov. Tiu ekipo certe sindone laboros por la bono de UEA kaj ni deziras sukceson.

La brazila movado havante du reprezentantojn havis du voĉrajtojn. La KKE estis reprezentita de S-ano Carlos A. Siqueira da Cunha, sed BEL ne sendis oficialan reprezentanton kaj Brazilo tiel perdis voĉon.

Ĉe la kunveno de landa agado estis

sugestite kaj unuanime aprobite, ke Maria Almada reprezentu BEL, kiel ĝia kunsilantino malgraŭ ke la prezidanto de BEL ne donis oficialan rajtigilon al ŝi.

La 65-a UK estis sukcesa. Aliĝis multaj personoj en la kongresejo mem.

Ĝia alta protektanto, S-ro Ingemund Bendgsson, prezidanto de la sveda parlamento salutis la kongresanojn en flua Esperanto, kiun li iam lernis. Li diris inter alie la jenon: "Lingva kompreniĝo inter homoj estas unu el la bazaj premisoj por konkordo en pli larĝa senco kaj je pli vasta nivelo. Reteni kaj evoluigi la konon de lingvo komuna por homoj de malsamaj naciecoj konsistigas valoran kaj pozitivan kontribuon al la laboro konservi pacan kunestadon en nia mondo. Ni estas certaj, ke viaj kongreslaboroj stimulos al pliaj konstruaj helpoj kaj sur la lingva kampo mem kaj sur tiu de interhoma kompreniĝo en pli vasta senco".

D-ro H. Tonkin estis intervjuita de la TV pri Esperanto-movado kaj la internacia lingvo. Same la radio el la sveda ĉefurbo diskonigis la UK-on grandskale.

Kelkaj gzetoj komentariis pri la evento kaj elmontris klare, ke mankis al ili korektaj informoj.

La oficiala bankedo okazis en la "Ora Salono" de la urbestrejo. Ĝi estas mirinda! Estas elstariginda la akcepto de la kongresanoj ĉe la Stockholma urbdomo. La konstruaĵo estas vera monumento kaj la akceptado estis altnivela. Al la kongresanoj estis servita vespermanĝo kun ceremonio, kiun oni dediĉas al la plej elstaraj invititoj.

Sur la riĉe servitaj tabloj la kunmanĝantaro trovis frandaĵojn laŭ la plej postulemaj gustoj. Bongustaj fiŝoj, kaviaro, fromaĝoj, kuiritaj legomoj, freŝaj salatoj ornamis la pladojn kaj la ruĝa kaj blanka vinoj, krom la biero kaj refreŝigaj trinkaĵoj surtabligitaj atendis la bankedpartoprenintojn.

La deserto konsistis el diversaj fruktoj, kuŝantaj sur bele ornamita tablo.

La "Kongresa Kuriero", taga informilo dela kongreso faris kelkain rekomendoin por la esperantistaro sub la titolo "Esperanto en la 80-aj jaroj". Ĝi konstatas, ke "La nuna Esperanto-movado, nacia kaj internacia, estas multe tro fermita al la ekstera mondo. De ekstera vidpunkto ĝi ofte havas sektecan aspekton. Pluraj el la praceloj de Esperanto, kiujn multaj agemuloj ankoraŭ fidele sekvas, ne estas realigeblaj kaj ne plu taŭgas al la nuntempaj vivo kaj evoluo. La movado kaj ĝiaj instancoj ne havu centrisman, sed federaciisman strukturon. Estu forlasita la ideologio de "Familia rondo", kiu mallogas eksterajn interesiĝantojn", asertas interalie la redaktoroj de la "Kongresa Kuriero N° 6-a".

## 66-a UK en Brazilo

Dum la kongresa semajno funkciis en la kongreshalo la informejo de la venontjara UK. La L.K.K-anoj Neima C. Adorno, Enivaldo Alves Silva kaj Carlos A. Siqueira da Cunha staris je dispono de intresatoj ĉe speciala giĉeto preparita por la informoj kaj aliĝoj al 66-a UK okazonta en Brazilo.

Belaj glumarkoj memorigante Brazilan estis disventitaj kun granda sukceso pro la intereso vekita kaj pro la beleco elmontrita, kio estis taŭga propagando.

Oni trovis ĉe la brazila giĉeto la geedzojn Grattapaglia kaj ilian filon Dario, la geedzojn Almada kaj Eleus el Bahia. Ĉiuj klopodis propagandi pri la venontjara UK en nia lando.

Post la finiĝo de la 65-a UK, la s-anoj Silva kaj Cunha prezentis belegan filmon pri Brazilo kun teksto en Esperanto propagandcele, kiu estis alloga al ĉeestantaro pro la vidindaĵoj montritaj.

La filmon niaj s-anoj Cunha kaj Silva prezentis en Danlando, Anglujo, Portugalujo kaj Hispanio, kien ili iris varbi aliĝontojn al nia kongreso.

S-ano Cunha sciigis nin, ke dum la kunveno de la LKK-anoj kun UEA-anoj estis decidite, ke la kongreskotizoj restu la samaj por brazilanoj ĝis la fino de 31-a de decembro venonta, kio estas grava sukceso por ni, kaj nun volu ĉiuj brazilanoj interesatoj eluzi la okazon kaj aliĝu al la 66-a UK sen prokraste.

Volu mendi ĉe la LKK belain glumarkojn kaj propagandu ĉie pri la grava evento okazonta en la venonta jaro. La glumarkoj estas tre belaj, cetere unu el la plej belaj en la historio de Esperanto.

## NONO RICEVITA

Por la I. Bulteno:
Ricevite en Brazilja:

| | Cr$ |
|---|---|
| Vivaldina M. Caymmi. . . . . | 100,00 |
| Sérgio Luiz S. Santos . . . . . | 100,00 |
| Alvaro Rabelo. . . . . . . . . . | 500,00 |
| Ricevite en Santos: | |
| Claudio Zimmermann(julio/aug) | 300,00 |
| Gilberto A. Silva Velho . . . | 300,00 |
| Prof. João B. Fonseca . . . . | 100,00 |
| Josefina Wranka (Argentinio). | 1.040,00 |
| João José Robl . . . . . . . . | 500,00 |
| Antonio João F. Padilha . . | 50,00 |
| Sumo . . . . . . . . . . . | 2.990,00 |

## I-A SUD-BRZILA BENKOTIĜO DE ESPERANTO

La Esperanto-Societo el Porto Alegre (RS) kune kun la Esperanto-Societoj el Rio Grande (RS), Pelotas (RS), S. Leopoldo (RS), Cachoeira do Sul (RS) kaj aliaj organizaĵoj el Ŝtato Paraná, inter kiuj Esperanto-Instituto el Londrina, patronitaj de Brazila Konsilantaro de Esperanto organizas la eventon en la ĉefurbo de Rio Grande do Sul - Porto Alegre, de la 19-a ĝis la 21-a de septembro, 1980. La temo estas: "La Esperanto-movado en la Sudo".

Malgraú la mallonga tempo, kiun la organiza komitato havas, laú la bone ellaborita programo, la Renjontiĝo elstariĝas fruktodona kaj grandioza.

D-ro Ivo Sanguinetti, kunordiganto, helpata de pluraj kunlaborantoj, elstaraj membroj de la societoj cititaj klopodas kontentigi la ĉeestontojn.

La 19-an de septembro je la 20:30 horo okazos la solena malfermo en la sidejo de la Sociedade de Engenharia do Rio Grande do Sul, Travessa Acelino de Carvalho nº 80 kaj poste, je la 22-a horo, en "35-Centrp de Tradições Gaúchas", Avenida Ipiranga, 5200, sin prezentos la fama folklora grupo el tiu ŝtato.

La eventon plezurigos promenado per boato sur la rivero Guaíba. Estos katolika, diservo, inaŭguro de busto de Zamenhof en la urbo Rio Grande, donace ricevita de D-ro Braz Cosenza, prezidanto de KKE. La esperantistaro ekskursos al Rio Grande per la maro kaj faros aliajn vizitojn al diversaj lokoj. Okazos prelego pri la Esperanto-movado en la fakultato de Rio Grande kaj estos ankaŭ eluzita la oportuneco por propagandi pri la 66-a UK preparata por Brazilja venontjare.

Por la Renkontiĝo estas petata la kotizo de Cr$ 400,00 kaj la kromaj elpezoj estos pagataj aparte, de la partoprenontoj.

Oni povos ĉion pagi ĉe la kongresejo post la alveno: Manĝaĵo - po Cr$ 180,00; Vojaĝo per boato Cr$ 100,00. La gazeto "Correio do Povo" diskonigas la Renkontiĝon.

Espereble la brazilanoj, ne nur de la sudo, sed ankaŭ de aliaj regionoj eluzos la okazon por viziti la sudon de nia lando, kie oni povas ĝui nekonatajn kutimojn kaj allogaĵojn interesajn, inkluzive gustumi la faman sensukeran mateon (chimarrão). Certe geesperrantistoj el Brazilja, San-Paŭlo, Rio de Janeiro, Santos, ktp. ĉeestos la renkontiĝon partoprenante la disvolviĝon de la evento.

Ni invitas la gesamideanojn partopreni la renkontiĝon kaj propagandi pri ĝi, elstarigante la movadon en la suda parto de nia belega lando.

Dank' al organiza kapablo de D-ro Ivo Sanguinetti kaj tuja apogo de D-ro Ernani Dias Corrêa kaj sindona kunlaborado de aliaj dinamikaj gesamideanoj, ekmarŝas la movado en la sudo de Brazilo.

Tiel agas la vicprezidantoj de Brazila Konsilantaro de Esperanto. Gratulon!

## INFORMAÇÕES ÚTEIS

Coordenador do 1º ESBE: - Arq. Ivo Sanguinetti - Fone 31-0462

Esperantista Societo de Porto Alegre: - Andradas, 1137 c. 1704 - Fone: 25-3941

Presidente da ESPA: arq. Ernani Dias Corrêa - Fone 24-0094.

O selo usado vale dinheiro. O selo comemorativo vale mais do que o comum. O (a) esperantista pode aproveitar a oportunidade e usar selos comemorativos. Eles constituem fonte de renda, e isso pode servir para as nossas instituições. A própria UEA pede que se use selos filatélicos (comemorativos): Revista Esperanto julho/agosto, p. 140, e novembro, p. 199, ambas de 1979.

| HOTEL | Casal Cr$ | 1 Pessoa Cr$ | 3 Pessoas Cr$ | |
|---|---|---|---|---|
| 1. Embaixador | 2.717,00 | 2.453,00 | | 1-2-3-4-5-6-7 |
| R. Jerônimo Coelho, 354 - Fone: 21-5622 | 1.947,00 | 1.749,00 | 3.267,00 | 1-2-3-4-5-6-7 |
| 2. Everest R.Duque de Caxias, 1357 | 2.717,00 | 2.453,00 | 3.267,00 | 1-2-3-4-5-6-7 |
| 3. Glória Trav. Acelino Carvalho,67 - Fone: 24-6433 | 868,00 | 650,00 | 1.208,00 | 1 |
| | 600,00 | 348,00 | 800,00 | |
| 4. Laçador Rua Uruguai, 330 | 556,00 | – | – | 1 |
| 5. Lido | 2.046,00 | 1.242,00 | 2.346,00 | 1-2-4-7 |
| R. Andrade Neves, 150 | 1.859,00 | 1.678,00 | 2.230,00 | 1-2-3-7 |
| Fone: 25-7913 | 1.430,00 | 1.287,00 | 1.716,00 | 1-2-3-4a. |
| 6. Savoy Av. Borges Medeiros, nº 688 - Fone: 24-0511 | 1.180,00 | 940,00 | 1.416,00 | 1-2-3-5-7 |
| 7. Uruguai Rua Dr. Flores, 371 | 750,00 | – | 1.000,00 | 1 |
| Fone: 25-6302 | – | 380,00 | | – |

## CONVENÇÃO

1 - apart. c/banheiro privativo;
2 - ar condicionado
3 - telefone
4 - televisão colorida
4a - televisão preto - branco
5 - rádio
6 - Frigobar
7 - Carpetado.

**DESPESAS PRESUMÍVEIS - REFEIÇÕES**: – Cr$ 180,00 cada.

Passeio de Barco: 100,00 cada

Ônibus para Rio Grande: 540,00 (Ida e volta).

OBS.: Passeio pela cidade e apresentação folclórica são gratuitos.

Está sendo promovida hospedagem gratuita para jovens.

## GARANHUNS (PE)

## II-A NORDORIENTA RENKONTIĜO DE ESPERANTO

En Garanhuns, Pernambuco, okazis la evento, de la 4-a ĝis la 6-a de julio, 1980 kun partopreno de ĉirkaŭ 100 personoj kaj ĝi brile sukcesis, laŭ la informo de Mag. J.M. Mabesoone, nia vicprezidanto.

La Renkontiĝon patronis BEL kaj la temo estis "Instruado de Esperanto". Oni jam fiksis la 3-an Renkontiĝon por la venonta jaro, en Maceió (AL) kaj la 4-an por João Pessoa (PB).

Partoprenis la 2-an geesperantistoj el la jenaj Ŝtatoj: - Ceará, Rio Grande do Norte, Paraíba, Pernambuco, Alagôas kaj Bahia.

Estis varme pridiskutitaj la interrilatoj de la tri organizajoj landaj kun nekonata rezultato.

Ni amike gratulas la gesamideanojn el Garanhuns pro ilia fortostreĉa laboro, dank' al kio la Rendontiĝo estis sukcesa. Tiel la movado vigliĝas kaj kreskas en Brazilo, kio estas nia vera celo.

## ILHEUS (BA)

S-ano Eleus L. de Sá partoprenis la 65-an UK'on en Stockholmo, Svedio, kie li informis nin pri la de li antaŭvidita renkontiĝo de Bahia Esperanto-Societo en Ilheus, kiam la Ilheus Esperanto-Grupo fariĝos 27-jaraĝa, asertinte, ke ĝi ne plu

okazos pro neatenditaj kialoj.

Nia vicprezidanto Eleus estas instruanta la internacian lingvon al ĉirkaŭ 20 personoj. Lia pionira laboro estas laŭdinda.

Anstataŭ la loka renkontiĝo okazos parto de la oficiala internacia postkongreso en tiu konata kaj pitoreska urbo. Ek la laboro!

## BELO HORIZONTE (MG)

D-ro Helio F. Aderne informas nin, ke dum la 1-a Tutamerika Esperanto-Kongreso okazinta en San-Luiz, Argentinio, li en la nomo de la Brazila Esperantista Kuracista Rondo prelegis pri la "Aspektoj de la lukto kontraŭ akcidentoj en Brazilo", kun ekspozicio pri la afero. Estis eldonita speciala numero de la "Medicina Heroldo" por la Tutamerika Kongreso.

D-ro Fontoura Aderne prelegis pri la sama temo ankaŭ en Urugvajo kaj Ĉilio, pritraktinte la Brazilan Medicinon kaj Esperanton, eluzinte kolorajn diapozitivojn riĉe ilustritajn. Tio signifas, ke la faka Esperanto agado en Brazilo bone evoluas.

## BRAZILJA (FD)

S-rino Ursula Grattapaglia, unu el la direktoroj de UEA, loĝanta en Brazilo, estis la dua, tuj post la nomo de D-ro Tonkin, kiu ricevis la plej multajn voĉojn dum la universala voĉdonado por komitatanoj.

En Stochkolmo ni intervjuis ŝin, kaj ŝi informis, ke en la I-a Tutamerika Esperanto-Kongreso en Argentinio partoprenis pli ol 350 personoj el 8 landoj. Inter la partoprenintoj troviĝis la prezidanto de UEA, D-ro Humphrey Tonkin, kiu estis oficiala gasto de San-Luiz. D-ro Tonkin promesis al ni, ke en la venonta jaro li vizitos Brazilon por nia 66-a UK, kaj kun longedaŭra restato en nia lando.

S-rino Grattapaglia laboras multe por ke la venonta UK en Brazilo estu sukcesa, kion ni sincere deziras.

## RIO DE JANEIRO (RJ)

La ge-Sroj Yolanda Evangelista da Silva, Bento Pires de Rosa Filho kaj Delio Pereira de Souza klopodas restarigi la "Associação Esperantista do Rio de Janeiro", kiu jam de longe ne aktivas. Ili estas kunvokantaj assembleon por elekti direktoraron celante eklabori en tiu tradicia organizaĵo. La kunveno okazos en la ejo de Kopakabana Esperanto-Klubo, strato Hilario de Gouveia, 66, 10-a etaĝo, ĉambro 1011. Ĉiuj geesperantistoj estas petataj aperi tie la 23-an de aŭgusto je la 16-a horo. La organizantoj antaŭdankas.

## Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz

Informas, ke "La Komitato decidis ne plu fiksi minimuman kotizon kiel ĝis nun, tiel, do, la **Fondintoj, Efektivaj kaj Simplaj Membroj** kontribuos per jarkotizoj, laŭ sia plaĉo kaj kapablo, kaj la **Korespondantoj** (el nepagipovaj landoj) per literaturaj verkoj aŭ poŝtmarkoj el siaj landoj, konsente kun la Estraro, laŭ la paragrafo 4-a de la Statuto.

Bilanceto de la dua trimestro: Enspezo: Antaŭa saldo Cr$ 11.633,04; Kotizoj Cr$ 7.360,75; Libroj Cr$ 15.014,15; Fonduso Iŝmael Gomes Braga Cr$ 82.125,00; Fonduso Porto Carreiro Neto Cr$ 31.400,00; Elspezo: Diversaĵoj Cr$ 1.010,00; Poŝtmarkoj Cr$ 1.872,40; Libroj aĉetitaj Cr$ 14.140,41; Libroj eldonitaj Cr$ 123.000,00; Posta Saldo Cr$ 7.510,13. Sumo Cr$ 147.532,94. - La ESTRARO.

## JUNDIAÍ (SP)

Malofte ni aŭdas pri la agado de la esperantistoj en tiu ĉi urbo, ŝajnas, ke ĉio stagnas, sed en la monato julio de la kuranta jaro, finiĝis la unumonata Esperanto-Kurso kun 48 gelernantoj de 8 ĝis 70-jaraĝaj. La sukcesan kurson gvidis prof-ro Roberto Gomes Freitas, kiu silente sed senĉese aktivas en Jundiaí.

Prof-ro Gomes Freitas jam instruis Esperanton en tiu urbo al 300 personoj. Estis li, kiu interesigis nian vicprezidanton Majoro Gilberto A. Silva Velho pri nia movado kaj instruis al li la internacian lingvon.

La prezidanto de la Jundiaí-Esperanto-Grupo, D-ro Ilton Arnaldo de Abreu Arruda, reaktivigas la societon kunlabore kun s-ano Gilberto Silva Velho. La ĵus finitan kurson apogis la urbestro kaj la fermo-ceremonion ĉeestis s-ro Ge-

raldo Tomanik, reprezentanto de la urbestro, Elvira Fontes, prezidantino de San-Paúlo Esperanto Asocio, Gilberto Silva Velho, reprezentanto de BKE kaj aliaj esperantistoj. Ni deziras daúran sukceson al ĉiuj.

## BAURU (SP)

Kiel ĉiujare la Bauru-Esperanto Societo de Esperanto sendis al ni jarraporton pri la agado de la societanoj.

La gazeto loka "Jornal da Cidade" ĉiudimanĉe aperigas artikolon sub la titolo: "Que língua falar?".

En la kolegio "Escola Progresso" instruas la internacian lingvan prof-ro Antonio João Fraga Padilha. Ankaú en la "Liceu Noroeste" okazis pluraj kursoj, ĉar la bauruanoj sin preparas serioze por partopreni grandnombre en la 66-a UK, venontjare.

La societo realigis renkontiĝojn, ekspoziciojn kaj estas unu el niaj antikvaj societoj, kiuj meritas ĉies admiron.

La aktivuloj estas:

**Konsilantoj kaj Direktoroj**: - Euclydes Geraldis de Carvalho (prezidanto), Nadir do Nascimento Serra (vicprezidanto), José dos Santos Simas (1-a sekretario), Helena Moré (2-a sekretario), Maria Encarnação Moreno (1-a kasistino), Ivon Barbosa kaj poste Clotilde Gomes Maldonado (2-a kasistino), Alice Aparecida Mendes de Carvalho, Gilberto de Oliveira Guidon, Léa Silvia Braga de Castro Sá, Lourdes Santinho, Luiz da Costa Vital, Maria Luiz de Souza kaj Sebastião Paiva.

## NI KONDOLENCAS

En la monato julio pasinta forpasis s-ano Oswaldo Arruda Stein el Cravinhos. Prof-ro Stein estis la fondinto de la loka Esperanto-Societo "Couto Fernandes Esperanto-Klubo", en la jaro 1938-a.

En 1966 li fondis ankaú Ribeirão Preto Esperanto Klubon. Li ek de 1938 ĝis 1967 instruis Esperanton en diversaj kursoj kaj lokoj. Li estis honora membro de "Ribeirão Preto Esperanto-Klubo", informis nin s-ano Pedro Miranda el tiu urbo.

Ni kondolencas la familion Stein.

En San-Paúlo, la 2-an de aúgusto kuranta forpasis nia konata samideano Nelson Silveira. Li dum longa tempo aktivis en San-Paúlo Esperanto-Asocio; kiel prezidanto de la societo li servis dum du periodoj.

S-ano Silveira estis ĝisosta esperantisto. Li instruis la lingvon, kaj verkis artikolojn por la konata gazeto "Diario Popular". Li helpis finance al ĉiuj aktivaj societoj. Temis pri bonkora, sentema kaj bona persono.

**Li partoprenis la 1-an Kongreson de BKE en Juiz de Fora, helpis aĉeti la sidejon de BKE en Brazilja kaj estis nia aktiva vicprezidanto. Ĉiam gaja eĉ kiam malsana, kio daúris pluraj jaroj, ĉeestis ofte la aranĝojn de la societo, kion li faris regule.**

**Ni memoros pri li kun kortuŝa saûdo, kaj kondolencas lian edzinon Eliete kaj familianojn.**

## SAN-PAÛLO (SP)

La San-Pauula Esperanto-Asocio daŭre kaj regule aktivas. La prezidantino Elvira Fontes gvidas diversajn kursojn.

Ekzistas bonegaj lernolibroj kaj aliaj esperantaj periodaĵoj aĉeteblaj en ĝia sidejo, inter kiuj troviĝas verkoj de Prof-ro Walter Francini kaj de F.S. Almada (Esperanto Elementar).

La estraro de Brazila konsilantaro de Esperanto dankas la 90 librojn donacintajn de Prof-ro Walter Francini, kies vendado estas por helpi al aĉeto de la sidejo de BKE. Kiu aĉetas tiujn librojn nerekte helpas la movadon.

## GAZETOJ RICEVITAJ

Bulteno de BEJO, Correio do Povo, Svisa Fervojisto, O Lider, O NOSSO, ZET de Jugoslavio, Gazeta da Bahia, Kvakera Esperantisto, Diário de Taubaté, Jornal de Jundiaí, A Notícia, Jornal dos Congressos, Correio Fraterno do ABC, Sekso kaj Egaleco., Bulteno de Alagoas, Brazila Katoliko, Boletim de APE, Suda Stelo, Nova Era, Popola ĉinio, kiun ni dankas.

## KIAL NUR STAMPO?!...

S-ano Prof-ro Benedicto Silva el Monte Aprazível sendis al ni protestleteron ĉar li estis informita, ke la Poŝto el-

donos por la 66-a UK nur stampilon. Laŭ Prof-ro Silva tio estas malmulte. La Poŝto devas eldoni poŝtmarkojn omaĝe al la unua UK de Esperanto okazonta en la Suda Hemisfero. La filatelistoj deziras belajn poŝtmarkojn kune kun la stampilo. La filatelistoj pravas!

Brazilanoj, filatelistoj aŭ ne, volu Skribi petleteron tiucense al la preciza persono, kiu pritraktos la aferon: "Senhora Lais Scuoto, Chefe da Assessoria Filatélica do ECT - SNB - Projeção 31 - 20º andar - CEP 70.002 - Brasília (DF).

## CAÍ (RS)

La Vicprezidanto de BKE, s-ano Otto Vaske, proponas jene propagandi pri Esperanto kaj pri la 66-a UK: "Por BKE-Bulteno: POŜTKARTUZADO - Propagando kaj bruo priatentigas pli ol amasoj da bonintencoj.

Nun, unu jaro antaŭ la 66-a UK, ni vaste diskonigu la simplan strukturon de Esperanto. Kial ni kutime kajrare enkovertigas niajn E-tekstojn? Kiam oni ne prisekretumas gravajn privatajn aferojn oni nepre uzu poŝtkartojn. Prefere tiajn kiuj liveras nacilingvan resumon, kiel ŝlosilon, por je ne esperantistoj tuj akiru eblecon deĉifri niajn E-tekstoj kaj konvinkiĝu ke ankaŭ ili kapablos regi nian lingvon. PK faciligas korespondadon kaj malmultekostas (ĉirkaŭ po Cr$ 2,00). Ĉiu E-organizo devus presigi tiajn PK-ojn, grandaj laŭ oficiala koverto, kaj favorpreze disponigi ilin al uzontoj. Ek al ...

Li ankaŭ aldone sugestas la jenon:

## PASPORTA SERVO

Dum la jaro de 1a 66a UNIVERSALA KONGRESO ni devas entuziasme kaj propagande brui. Ĉiu brazila samideano fariĝu gastiganto. Eĉ surplanka dormebleco ofertindas. Estu antaŭa perletera interkonsento kun interesato (j). Tiel okazos nenia ĝeno ambaŭflanke. Ni dekobligu la brazilan adresaron dum la jaro en kiu eble pluraj centoj da fremdlandanoj vizitos nian landon. Kiu ne ĝojus gastigi almenaú dum 2 - 3 tagoj usonanon, eúropanon, afrikanon aú azianon kiu nun devigos ne krokodili?

Sufiĉas ensendi vian adreson kaj 10 INTERNACIAJN RESPONDKUPONOJN (10 IRK), aĉeteblajn en poŝtoficejo, al:

J.M. Cash - 9 rue du Languedoc - F 78690 Les Essarts-le-Roi. Francio.

Vi ricevos liston enhavantan pli ol 360 adresojn de gastigantoj en 48 landoj. Do, ek al, sen tempoperdo tiel ke la venontjara eldono enhavu ankaŭ vian adreson.

Ĉiu samideano nepre fariĝu ankaŭ Membro Abonanto (MA) kaj aliĝu al la UKongreso. Ni igu Brazilon avangardo de tutameriko!

## MALĜOJA KOMUNIKO

Kio kulpas? ... La prezo de nia bulteno estas nun pli peza ... sed ni havas seriozan kompromison: ni ĝin aperigos kaj vi ĝin legos, Dio permesos.

CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO
CGC 00 406 504/0001 06 Brasília

BALANCETE DE VERIFICAÇÃO
Em 30-06-80

| DÉBITO | |
|---|---|
| CAIXA | 5.120,12 |
| BANCOS | 22.684,75 |
| C/CORRENTES - F.S.Almada | 5.212,10 |
| BENS RECEBIDOS EM DOAÇÃO | 9.860,00 |
| IMÓVEIS | 320.000,00 |
| MÓVEIS E UTENSÍLIOS | 27.700,00 |
| DESPESAS COM BOLETIM INFORMATIVO | 18.417,20 |
| DESPESAS DA SEDE SOCIAL | 18.787,69 |
| DESPESAS COM CONGRESSOS PRÓPRIOS | 12.950,00 |
| DESPESAS DE DONATIVOS A ENTIDADES ESPERANTISTAS | 7.825,00 |
| DESPESAS GERAIS | 5.355,30 |
| | 453.912,16 |

| CRÉDITO | |
|---|---|
| CONTRIBUIÇÕES PECUNIÁRIAS, RECEBIDAS | 15.758,10 |
| DONATIVOS PRÓ-SEDE PRÓPRIA, RECEBIDOS | 171.000,00 |
| RECEITAS DE CONGRESSOS PRÓPRIOS | 28.600,00 |
| RENDAS DIVERSAS | 503,04 |
| CREDORES POR SUPRIMENTOS À CAIXA - Carlos A.S.Cunha | 15.000,00 |
| FUNDO SOCIAL (PATRIMÔNIO) | 223.051,02 |
| | 453.912,16 |

Brasília (DF), 30 de junho de 1980

Casc/.

Carlos A.S.da Cunha
Tesoureiro
CRC.SP 43.051 - CRC.S.DF 360



*Na galeria de Arte da Prodesan – Prefeitura Municipal de Santos, houve uma exposição de pintura entre os dias 8 a 15 de julho p.p. sob a direção do Prof. Guerreiro.*

*Entre os participantes do acontecimento achava-se nossa redatora, Maria Almada que contribuiu com 4 trabalhos.*

*Na foto vê-se o Prof. Jorge Guerreiro, mestre da pintura e poeta, diante de um dos quadros de Maria Almada.*

**AMO, ĈIAM AMO ...**

**De Dokito**

Kiam la tag' alvenas al la fino,
kaj la Natur silentas kun malĝoj',
mi haltas, triste, meze de la voj'
pro rememor' de mia amatino ...

Ŝi tiel belas ... vera sunfilino,
kun blondaj haroj kaj helega ĝoj'
kiun mi vidis je l'unua foj',
kaj ne foriĝis plu el mia sino! ...

La tempo pasas. La maljun' alvenas ...
Malica sorto vere min malbenas
dum tuta vivo - ŝia forestado ...

Kaj je ĉi horo plena de tenebro,
Jen mi deliras, brulas pro la febro,
Febro de Amo, febro de Saŭdado! ...

Manoel Borges dos Santos

CENTRO DE CÓPIAS